4-a Jaro. N-o 193 APERAS SEMAJNE 14. Junio 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LANDO DE SUNO — KAJ MALSATO[1]

Hindio estas tiel stranga, tiel vasta, tiel plena je svarmanta loĝantaro en variaj gradoj de ekonomia kaj kultura malvolviĝo, ke ĝi kvazaŭ malebligas priskribon. Oni povas, tamen, fari iujn definitivajn raportojn, kiuj ebligus al aliuj imagi Hindion laŭ ĝenerala konturo. Oni povas diri, ekzemple, ke el la loĝantaro de Hindio la grandega plimulto malsatas ekde sia naskiĝo ĝis la morto.

Tamen la grandega plimulto estas terkulturistoj, kamplaboristoj kaj provizantoj de nutraĵoj. La naturo estas malavara en Hindio — sed la agrikulturo estas bedaŭrinde primitiva, kaj la etkamparanoj estas ŝarĝitaj per multaj parazitaj elementoj. Ili simple ne povas ricevi sufiĉe da manĝaĵoj.

Oni povas diri, ke la klimato de Hindio estas varma, kaj ke Hindio estas lando de sunbrilego — kaj ke la popolo estas vere "infanoj de l' suno". La sunbrilo eniris ilian tutan fizikan konsiston — ĝi estas parto de ilia vivforto. Tial la enkonduko de la kapitalista industriismo en Hindio estas tiom tragedia en la nuntempaj cirkonstancoj.

EN LA MALHELO

La posedantoj de fabrikoj, de muelejoj kaj minejoj kaj aliaj entreprenoj trudas longajn laborhorojn al miloj kaj miloj el tiuj "infanoj de l' suno". La kapitalistoj — la indiĝenaj kiel la fremdaj — tenadas la kredon, ke ĉi tiuj proletigitaj kamparanoj, forprenitaj de kampoj, freŝa aero kaj sunbrilego, por laboregi en la malhelaj minejoj kaj malgajaj muelejoj kaj fabrikoj 12 kaj 14 horojn tage, devus ankoraŭ esti sanaj, fortaj kaj bonspiritaj. Ili imagas, ke la kondiĉoj de l' kapitalismo povas esti altrudataj en Hindio kiel en Anglio, sed senfine pli severe ol en ĉi-lasta sen domaĝo al la popolo, kiu tiom bezonas la sunon.



Muelante sian rizon . . .

Ili esprimas miron, ke ekkaptas la hindojn ofte reokazanta deziro eklasi la laboron kaj sin bani en la varmega suno. Ili miras pri la bolanta malkontento de la muel- kaj fabrikistoj. Evidentas, ke ili neniam pripensis la aferon.

Mi miregis pri la kompleta indiferenteco de la kapitalistoj, **speciale la indiĝenaj,** rilate la vivkondiĉojn de ilia Laboristaro. Malriĉa indiĝeno elmontras pli da intereso pri sia bovino aŭ kapro en unu tago, ol faras la kapitalistoj, ĉu registaraj, ĉu indiĝenaj aŭ alilandaj, pri siaj laboristoj dum tuta jaro.

Ekzistas multaj urbegoj en Hindio kun grandaj loĝantaroj. Estas alloge rigardi en la stratoj kaj bazaroj la popolamason, inter kiuj estas okcidentemaj indiĝenoj, vestitaj eŭropmaniere, aliaj vestitaj duon-eŭrope, ankaŭ aliaj tute orientaspektaj. Krom tiuj, estas aliaj, kiuj, laŭ la malalteco de sia socia rango, iĝas pli kaj pli nudaj, la plej granda parto portantaj nur la dhoti ĉirkaŭ la lumbo kaj ŝultroj, kaj multaj eĉ ne tiom multe. (Interesas noti, ke provizo al ĉiuj hindoj je unu kroma dhoti rezultigus plentempan laboron en la brita teks-industrio dum la tuta jaro.


TEMPLOJ KAJ DOMETAĈOJ

Kelkfoje oni vidas marmorajn templojn kaj belajn palacojn kaj la bangalo-ojn de la anglo-hindoj kaj eŭropanoj, kun bela verdaĵo; sed plej multnombraj estas la mizeraj dometoj de la popolo, kun siaj teraj 'plankoj'

[1]) K-doj Purcell kaj Hallsworth pasigis kelkajn monatojn en Hindio por studi la laborkondiĉojn de la tieaj laboristoj laŭ deziro de la Brita Sindikatara Estraro. Liaj konstatoj estas tiel gravaj kaj interesaj, ke ni ne volas prisilenti ilin en "S-ulo". Estas interese noti, ke laŭ la observoj de K-do Purcell la indiĝenaj mastroj estas samgrade ekspluatistaĉoj kiel la fremdaj, ke sekve nacia sendependeco neniel plibonigus la staton de l' hinda Laboristaro. Red.

— kiuj iĝas kotaj dum malseka vetero — kaj muroj ŝmiritaj per bovsterko.

Britio regis en Hindio pli ol cent jarojn; tamen, eĉ en tiuj ŝtatoj, kie



Hejmoj en Hindio

brita estreco plej evidentiĝas, oni preskaŭ neniel atentis sanig-rimedojn. La anglo-hindaj kaj eŭropaj loĝantaroj estas apartemaj, eĉ rilate sanigadon. Laŭŝajne por ili ne gravas, ke apudaj regionoj estas infektitaj per malario kaj ĥolero, eĉ en la grandaj urboj, kie okcidenta komercado starigis imponajn stratojn kaj domojn. La kvartaloj, kie loĝas la popolo estas nepriskribeblaj. La rubo kaj fekaĵo trafluas malfermajn strat-sulkojn antaŭ la dom-pordoj, kie la muŝoj svarme flugas, portantaj malsanon. Estas ja virinoj, plej grandparte belegaj, eĉ se malriĉe vestitaj, al kiuj oni pagas tage malpli ol 4 pencojn por zorgado pri la fendoj, en kiuj, ofte per la manoj, ili devas konstante movi la rubon.

La dom-kondiĉoj estas konformaj al la sanigado. Ĉiu dometo estas nur unuĉambra, senfenestra, konstruita el io havebla. Eble 12 personoj, el ambaŭ seksoj, ofte eĉ ne el sama familio, loĝas, manĝas kaj dormas en spaco de 2.50 ĝis 3.70 metroj kvadrataj.

Ĉi tiuj hejmoj estas tiom puraj kiom ebligas la kondiĉoj. Ekstere, sur la verando (ofte lupagata ekstre kiel loĝspaco!), kuŝas en kruda sving-lulilo infaneto, dormigita per opio, dum ĝia patrino laboras en fabriko. Ankaŭ estas nudaj gebubetoj, brunhaŭtaj, kun grandaj nigraj okuloj, ĝenerale feliĉaj, ludantaj en polvo kaj atakitaj de diversaj muŝoj — ĉio en brilega sunlumo. Estas odoro de ajlo kaj pro trodenseco de personaro; ofte netolerebla... jen la hejma vivado de milionoj da hindoj.

LA ĈEFA DEMANDO

La ĵurnaloj raportas pri strikoj kaj lokaŭtoj en Bombay, Kalkuto ktp. Estas multe da naskiĝanta ribelado ĉie en Hindio. Kiel supre-dirite, pli ol 250 milionoj da hindoj malsatas la tutan vivon; eĉ ili ne povas havi sufiĉe da rizo; ĉiam estas miloj, kiuj mortas per malrapida, turmenta malsato. La ĉefa malbono en Hindio estas esence m a l b o n o d e l' s t o m a k o. Ĉiaj demandoj pri politiko, konstitucio, kasto kaj religio, estas sensignifaj kompare kun tiu terura ekonomia demando. Eĉ pliigo po 1 penco tage por ĉiu familio, signifus grandegan plibonigon al la vivnivelo de la hindaj laboregantoj. Hindio tuj bezonas, pli ol ion, Sindikatismon, sindikatan movadon, kiu kuraĝe kaj trude traktos la demandon pri la stomako, la ekonomian demandon. A. A. P u r c e l l.

El "The Daily Herald" (La Ĉiutaga Heroldo).

LABORISTA SOLIDARECO EN FRANCIO

En la samaj tagoj, dum kiuj okazis en Berlino la granda ĉiujara kunvenego de la Ruĝa Fronto kun siaj elmontroj de laborista solidareco flanke de la Berlina loĝantaro, mi havis okazon sperti mirindan pruvon de viva laborista solidareco en Francio. En unu el la urbetoj, kiuj ĉirkaŭas Parizon ekster la fortikaĵa ringo, nomata B e z o n s (Bezon'), nordokcidente de Parizo, estis aranĝata dum pentekosto festo por la infanoj de la Pariza laborista kvartalo Belleville (Belvil), kiuj troviĝas sub la zorgado de la kooperativo "La Bellevilloise" (Belviluaz). La laborist-kamparana urbmagistrato de Bezons akceptis nin, pli ol 50 infanojn kaj dekon da plenaĝuloj kun vera frateco kaj gastemeco. Kiam ni forlasis la parizan urbregionon, transiris la Seine-riveron, ni sentis nin pli liberaj. Ne nur, ĉar la belega suno brilis de l' firmamento kaj donis belan perspektivon por la du tagoj de festado en kamparo, sed ĉar anstataŭ la reakcia administracio de Parizo, kiu malpermesas la movliberecon al la Pariza Laboristaro, nin atendis komunumo estrata de laboristoj. Kiam ni forlasis la tramon, nin salutis la revolucia kantado de l' infanoj de Bezons, kiuj havas tre fortan grupon prizorgatan kaj subtenatan de la magistrato. Ĉiuj infanoj de laboruloj povas eniri tiun kuniĝon. Oni faris manifestacion al la magistrata domo, kaj fronte iris la urbestro kaj la konsilantoj. De tie ni post mallonga ripozo moviĝis al iom ekstere lokita belega kastelo, kun parko, enfermita de murego. Estis la p o p o l d o m o de Bezons, kiel klarigis la afiŝoj gluitaj ĉe la enirejo sur la malnova kastela muro. Mi iom memoris pri mia vizito en Sovetio en tiu momento. Kaj vere, la Gek-doj de Bezons montris al ni dum tiuj du tagoj, ke ili ĉion faris, kio estas ebla sub kapitalista reĝimo. Ili plene eluzis la iomon da rajtoj, kiujn posedas komunumo, por kontentigi la dezirojn de la laborist-kamparana loĝantaro. Inter la loĝantoj troviĝas multaj, kiuj forlasis Parizon kaj instaliĝis ĉi tie en propra dometo. Plej ofte ne mankas legoma ĝardeno kaj aliaj komfortaĵoj, pri kiuj ne povas pensi la laborulo en la urbego, tute ne konsiderante la belegan puran aeron. Parolante kun la loĝantoj mi konstatis, ke ili kiel eble plej subtenas sian magistraton, por iom bonigi la komunumajn aferojn. Mi admiris la konstruan fervoron, la multecon de novaj dometoj, kiuj elkreskas kiel fungoj el la tero. Ankoraŭ la vojoj ne estas bone pavimitaj, nur la ŝoseoj estas bonkvalitaj, kiuj estas la ĉefvojoj de Parizo al aliaj malproksimaj centroj, kaj la kamparaj vojoj estas nur mezkvalitaj, kiel oni trovas ilin ofte en vilaĝegoj.

Ĉe la festo mem mi aŭdis bone kulturitan kantadon de ĥoro (i. a. la rusan Volga-kanton "Burlaki" mirinde prezentitan), kio estas notinda, ĉar en Francio la kantado kiel arto ne estas tre evoluinta. El paroloj de urbkonsilanto mi ĉerpis, ke la magistrato aranĝas ĉiuspecajn klerigajn kursojn, por infanoj kiel por plenaĝuloj. Nur mankas esperanto ankoraŭ en la programo. Sed fine de la dua tago, antaŭ ol ni adiaŭis, la urbestro esprimis la deziron, organizi baldaŭajn kursojn de esperanto en la kadro de la oficialaj kursoj de la magistrato.

Kio plej profunde ĝojigis min, estis la bonega kora akcepto de l' urbanoj per la loĝantaro kaj la sento, kiu tute regis min, pri aglibereco, kiun mi neniam havas en Parizo kun ĝia reakcia administracio. Estis pli da gepatroj, kiuj deziris "adopti" infanojn por nokta restado kaj manĝigo, ol infanoj mem "adopteblaj", kaj mi mem spertis la malavaran gastemecon de la tieaj Gek-doj en larĝa mezuro. Tiu praktika elmontro de solidareco ja multe pli valoras ol cent agitaj paroladoj. Refreŝigite, kun tre feliĉaj sentoj, ni revenis al Parizo. (1768)

Vi faris, kun multe da sukceso, agitadon por esperanto; via grupo estas multanara, kaj via memkontenteco estas videbla.

Vi tamen faras grandan eraron, se vi opinias, ke tio sufiĉas por firmigi kaj certigi la sukceson de nia afero. Vi devas plie atingi, ke viaj varbitoj ellernu la lingvon kaj ke la ellernintoj legu nian literaturon.

Aĉetu, aĉetigu la SAT-librojn;
Abonu, abonigu la SAT-gazetojn.

ELISÉE RECLUS

Filo de pastro, liberpensulo; anarkisto, kiu celis la plej fortan regadon — regadon sur sin mem; eksigito el lernejo pro malstudemo, plej klera kaj verkabunda sciencisto; severa por si, indulgema por aliaj, raciega homo, kiu metis bonkorecon en la unuan ecrangon; tia estis Elisée Reclus (Elizè Reklü'), kiu pasigis, de 1830 ĝis 1905, plej noblan kaj utilan vivon.

Li naskiĝis en Dordogne, Francio, de patro, kiu estis el tiuj maloftaj pastroj, kiuj enkondukas la kristanan moralon en la ĉiu-tagan vivon. Liaj multnombraj gefiloj, kvankam sin turnante for de lia kredo, amis kaj respektis lian karakteron, kiun ili grandparte heredis, aldonantaj al ĝi ne-ordinaran inteligentecon kaj sciamon. Krom Elisée, Elie (lia amata kunulo dum la plej granda parto de l' vivo), Paul kaj Onésime distingiĝis per scienca laboro.

Elisée ricevis siajn unuajn porrevoluciajn lecionojn ja en la medio de eklezia lernejo, kie li rimarkis la favoran traktadon al la riĉaj knaboj, ankaŭ la nacieman spiriton de la lernantoj germanaj kaj francaj, kiuj ofte interbatalis. Pli malfrue, li kaj lia frato Elie estis eksigataj de alia lernejo, ne volante perdi sian tempon por teologia instruo.


En 1851, Elisée komencis interesiĝi pri scienco, filozofio kaj sociologio, kaj iris por studi Berlinon, kvankam tro malriĉa por pagi la universitatajn impostojn kaj por reveni Francion aliel ol piede. Post la Napoleona perfortaĵo en tiu jaro, la du fratoj estis devigataj forkuri, kaj Elisée, post kelka tempo en Britio, iris al Norda Ameriko. Tute sen mon-rimedoj, li faris iun ajn man-laboron haveblan, ĝis li trovis bonan oficon, kiun li baldaŭ lasis, ĉar lia estro tenis sklavojn kaj li mem iĝis kontraŭsklaveculo.

En 1855—56, li sin trovis en Suda Ameriko, kiel terkulturisto, kaj en proksima jaro, post la amnestio, denove en Francio.

De tiu tempo, li povis trankvile sin prepari por sia granda laboro de geografo kaj baldaŭ komencis presigi en revuoj artikolojn pri geografio kaj politiko, precipe pri Ameriko. En 1868 ĝis 1869 aperis lia grava verko: *La Terre* (La Tero), kiu lokis lin inter la unuarangaj geografoj de l' mondo.

Sed... baldaŭ eksplodis en Parizo la Komuno, en kiu li, Elie kaj Paul batalis kun la ribelantoj. Ĉe la malvenkego, ili estis kaptataj kun aliaj miloj kaj evitis ekzilon nur per la interveno de usonanino kaj anglaj sciencistoj (inter kiuj, Darwin), kiuj hontigis la burĝan registaron ĝis amnestio al la distingitaj fratoj.

En 1872 oni lin trovas en Svisio, kie en 1890 li komencis sian *Universala'n Geografio'n* kaj sekvigis al la unua libro alian, ĉiun jaron regule. Ĉi tiu penega laboro ne malhelpis, ke



li partoprenu la naskiĝantan anarkistan movadon, kiun li helpis per ofta propagando kaj verkado.

En 1892 la Komitato de l' Ŝtata Universitato en Bruselo invitis lin doni kursojn pri kompara geografio, sed poste sin retiris, ĉar ili timis lian anarkistan tendencon. La rezulto estis, ke baldaŭ la pli kuraĝaj lernantoj kaj profesoroj fondis la Novan Universitaton, kie la amata Elisée instruis preskaŭ ĝis sia morto. En Bruselo li ankaŭ fondis Instituton de Geografio. Kvankam en la lastaj viv-jaroj li spertis malsanajn krizojn, tio ne malhelpis, ke li daŭris labori per verkado kaj lekcioj en diversaj landoj; ke li vojaĝis kaj eĉ ĝuis la vivadon; ke li gardis ĝis la fino sian mirindan entuziasmon kaj optimismon pri la antaŭeniro de l' homaro.

En 1903 finiĝis lia lasta granda verko, *L'Homme et la Terre* (La Homaro kaj la Tero), por kiu li unue ne povis trovi eldoniston en Parizo, kaŭze de sia konata anarkista tendenco, kvankam liaj unuaj verkoj portis grandan profiton al la eldonistoj; li sukcesis unue en Anglio presigi la volumojn.

Elisée Reclus estis el tiaj homoj, kiuj neniam disigas pensadon de agado; kiel lia patro, li vivis laŭ siaj principoj, pro kiuj ofte li devis suferi, ĉu per persekutado flanke de l' burĝaro, ĉu per falsa akuzado, ĉu per perfidaj friponaj "anarkistoj". Li forte kredis je edukado, kiel rimedo por revolucio; li pensis, ke anarkismo estas malpli kuniĝo de sociaj ideoj, ol ĝenerala vidado de l' spirito kaj koncepto pri la homa vivado. Li laboris ĉiam pri la "skulptado de la heroa figuro" kiun li prirevis — sia plej bona memo, sciante, ke nenia politika sistemo aŭ manko de sistemo povus daŭre bonefiki sen morala boneco — sindonemo, laborvolo kaj sciamo.

Kiel por Lenin, la laboristoj estis por li fratoj, kiujn li traktis ne kiel estro, sed kiel simpatianto kaj helpanto. Li malŝparis neniun simpation por tiuj, kiuj marŝas delikate inter siaj laborantaj kunhomoj; kiam amikino lin demandis: "Sed kio okazos al mia nevo en via nova socio; li povas nur laboreti?", li respondis: "Do, li manĝetos."

Eble neniam vivis homo, kiu pli bele kreskis laŭ la tri flankoj de l' homa naturo; li havis belan, noblan aspekton kaj estis fortika kaj atleta; lia pensado estis plej forta, profunda kaj efika; lia animo portis poezion en liajn sciencajn verkojn kaj elmontris lian grandan amon al la Homaro kaj al la Naturo; li kapablis akre observi ĉion en sia proksima ĉirkaŭaĵo kaj antaŭvidi malproksimajn tagojn senmezure pli belajn ol la nunajn. El la tri flankoj, eble profitos la homaro plej longe el la morala; la bela korpo nun putras; la sciencaj verkoj jam iĝas iom malaktualaj, kvankam ili restos legeblaj pro la translumigo de la poeta verkisto... sed la ekzemplo de boneco kaj nobleco restos freŝa tiom longe, kiom ekzistos kono pri ĝi...

Kompilita el speciala eldono de "Le Semeur" (La Semisto) de E. K. L.

Regna renkontiĝo de Ruĝa Fronto Tutgermania

Pro ebria policano proleto mortpafita

Dum pentekosto okazis en Berlino (ĉef-urbo de Germanio) la 4-a regna renkontiĝo de la Ruĝa Frontbatalanta Asocio germania (RFB.). Partoprenis pli ol 100 000 uniformitaj ruĝaj frontbatalantoj, krome ĉ. sama nombro da neuniformitaj proletoj, junuloj, junpioniroj el tuta regno, delegacioj de laborejoj, fabrikoj, organizoj sportaj ktp. La ruĝa renkontiĝo okazis sub agitvortoj: por eksterparlamenta almarŝo de la Proletaro post sukcesaj balottagoj pasintaj, kontraŭ kapitalista ekspluatado kaj subpremado, por defendo de Sovetio, por liberigo de germania kaj tutmonda Proletaro ktp.

Kvankam aranĝado kaj organizado de la renkontiĝo nur povis okazi post baloto al regna parlamento, do post la 20-a de majo, ĝi eĉ superis ĉiurilate la antaŭjarajn. Entuziasmo ĉe la partoprenantoj kaj precipe ĉe la tuta loĝantaro de Berlino (escepte de malmultaj "nigruloj", t. e. reakciuloj) estis nepriskribebla. La almarŝo okazis en plej bona disciplino — sed tio ja ne plaĉis al "regantoj de Germanio".

Kiam alkondukis K-doj de Berlino taĉmentojn el regiono Bremen al siaj loĝejoj en Berlin-Charlottenburg, policistoj penis provoki (ĉe alveno okazis severa esplorado kaj poste armeo da policistoj ĉiam akompanis ruĝajn taĉmentojn). Eĉ burĝa gazetaro, kaj tio estas plej signifa, raportas pri "tronervema policistaro, kiu ne regis la situacion". Ankoraŭ nur estis ĉ. 100 personoj, kiuj devis preterpasi stratkruciĝon, kiam policistoj penis haltigi la 100 personojn por "ordigi la trafikon". Ruĝfrontanoj ne konsentis al tiu provoko. Sed subite kaj hazarde ebria policano falis teren kaj tuj ... incitiĝemaj policistoj pafis, sen ia averto antaŭa, en la amasojn. Rezulto: juna 22-jara K-do el Bremen mortpafita, surdmuta virino grave vundita ĉe piedo, same infano kaj kelkaj aliaj personoj. Malgraŭ tiuj intencaj provokoj la Ruĝfrontanoj plej discipline evitis doni okazon al sangavida policistaro, mortpafi pli multajn klaskonsciulojn kaj aliajn personojn.

En sekvantaj tagoj ĉiuj taĉmentoj marŝadis tra la stratoj de Berlino kun standardoj portantaj funebran rubandon.

La dimanĉa manifestacio estis tre impona, ni vidis i. a. ankaŭ multajn standardojn ĉe RFB-taĉmentoj, kiujn ili ricevis de ekstergermaniaj organizoj, precipe de Ruĝa armeo sovetia, kun surskriboj ofte ankaŭ en esp-o. Sur la granda placo "Lustgarten" (Amuz-ĝardeno) samtempe paroladis 25 oratoroj al la amasoj de ĉiuj anguloj. Pretermarŝo ĉe la Asocia Estraro daŭris ĉ. 6 horojn, kvankam unu el la kvar manifestaci-vicoj ne povis pretermarŝi pro malfrua tempo (ja estis jam post la 21-a horo, kiam finiĝis la pretermarŝo).

La almarŝo de la Ruĝa Fronto en Berlino evidente montris, ke la germana Proletaro ne nur iris al baloto, sed ke ĝi konscias pri sia rolo, nome ankaŭ organizi batalon eksterparlamentan.

O. Bässler, Leipzig.

DU HOROJ EL MIA VIVO

Mi volas priskribi unu okazon el mia vivo, kiel ĝin devis travivi jam de 5 jaroj multaj K-doj, — du horojn de la 6-a de majo 1928.

Estis la 15-a horo. La vetero estis malbonega. Pluvo frapadis forte sur la fenestrojn. La vento blovis furioze, kvazaŭ ĉiuj diabloj en la infero de Dante estus elirigitaj! Ni kelkaj K-doj-esperantistoj sidis ĉirkaŭ malgranda tablo en la laborista klubo, parolante pri plej ordinaraj aferoj en esperanto. Subite la pordo de la ĉambro malfermiĝis, kaj kvin personoj kun bastonoj eniris. Unu el ili, verŝajne estro de la kvinopo, ekdemandis nin:

— Kiaj estas vi?

— Ni estas laboristoj.

— Kion vi faras ĉi tie?

— Tie ĉi estas laborista klubo, kaj ni rajtas viziti kaj sidi en ĝi.

— Vi rajtas sidi nur en karceroj, diris la estraĉo. — Ĉiuj iru antaŭ mi!

Ni obeis. Kiam ni alvenis policejon, la kvinopo da detektivoj enŝlosis nin en ĉambro kaj komencis la traserĉadon. Kelkaj el ni tuj estis liberigataj. Ni restis nur duope. Min elvokis la estraĉo en alian ĉambron por nova "traserĉado". Sed la "traserĉado" komenciĝis ankoraŭ ĉe la pordo. Forta piedfrapo sur la ventron trafis min. Mi falis sur la plankon. Tuj poste la frapoj per guma vipo komencis fali sur la kapon, kolon kaj dorson. Post duonhora batado kaj insultado, kiam la planko fariĝis ruĝa je mia sango kaj sur mia korpo ne restis loketo nevundita, ili levis min kaj eĉ ne demandante kiel mi estas nomata, liberigis min, dirante ke mi ne iru plu en laboristajn klubojn.

Kiam mi, apenaŭ povante marŝi, alvenis ĉe la laborista klubo, estis la 17-a. Iom poste venis la alia K-do same tiel batita kiel mi! . . .

Tiel pasis du horoj el mia vivo.

SAT-ano Simĉil (Bulgario).

Pri loĝejaj cirkonstancoj de la arbarlaboristoj en Norda Finnlando

En Norda Finnlando lignaĵindustriaj kompanioj konstruas arbarloĝejojn por la laboristoj. Ili dum sia labordaŭro loĝas vintratempe en tiuj arbaraj regionoj, kie ili dehakas arbtrunkojn kiel krudaĵon por ligna industrio.

De ekstere tiuj dometaĉoj aspektas tiel mizeregaj, ke estas neeble kredi, ke ili estas homaj loĝejoj. Oni konstruas ilin el senŝeligitaj lignoj, kiujn oni netaŭge kunligas. La muroj kompreneble estas malfortikaj, tiel ekstere kiel interne. La plafono enlasas akvon, ĉar la tegmento estas ofte tro proksima al la plafono. La ĉambro ofte trovarmiĝas tiel multe, ke la akvo gutas de la plafono. Ankaŭ kiam la neĝo degelas sur la tegmento, la loĝantoj devas esti en la "pluvo". Ekzistas ankaŭ speco da arbaraj dometaĉoj, en kiuj la ĉevalejo estas konstruita kunece kun homa loĝejo, nur disigita per maldika intermuro. La fekaĵon de la ĉevaloj oni elĵetas apud la irejo, laŭ kiu la laboristoj vizitas la dometaĉon. Por nutraĵoj oni ne konstruas ŝirmejon. Ĉe la muroj de la kabano estas najlitaj kelkaj kroĉiloj kaj bretetoj, sur kiuj oni metas nekovrite lardon, viandon kaj aliajn nutraĵojn, de kie ili eĉ povas fali en la sterkamason. La plankoj de la dometoj neniam estas faritaj el segita aŭ eĉ rabotita ligno, sed simple el senŝeligita rondligno. Kaj ofte per tio oni ne kovras la tutan areon de l' ĉambro, sed lasas senplanka trionon aŭ duonon. El dehakitaj, tre neebenaj tabuloj oni faras etaĝajn litojn ĉe la tri muroj de la ĉambro. La plej malsupra lito estas duonmetron alta. Inter ili restas speco da koridoro. Neniam troviĝas sub ili planko. Sur tiuj litoj la laboristoj pasigas la nokton sen litaĵaro. Nur jakon ili volvas kiel kapkusenon. Ili enlitiĝas kun la laborvestoj plejparte eĉ malsekaj post la laboro ĉe arbaraj trunkoj. En loĝejo, kies areo estas 8×8 metroj, amasiĝas vintre 15, 25 eĉ 30 viroj. La alteco de loĝejo varias inter 190 kaj 235 cm. Ĉar tiaj amasoj da laboristoj ariĝas en malvasta loĝejo por tranokti, kompreneble la vestoj neniam sekiĝas, kaj la loĝantoj ne povas ricevi freŝan aeron por spiri. Ventoliloj ja ne ekzistas, kaj lumo mankas preskaŭ tute. En loĝejoj de supre citita grandeco oni havas nur du fenestrojn de 30×70 cm., kiuj estas senkadraj. Ĉar la fenestroj devas esti malsupre, oni nur en malmultaj dometaĉoj povas vidi la ĉielon. La pordoj estas faritaj el dehakitaj tabuloj, sed tiel maldense metitaj, ke oni povas trarigardi, kaj dum neĝblovado la neĝo penetras tra la pordo en ĉambron. La fornoj estas nur simplaj kun nefermitaj fajrujoj, aŭ ladkamenoj. La fajro devas

resti ĉiam brulanta, ĉar ne estas fornoklapoj aŭ aliaj fermiloj.

Tiajn loĝejojn oni eĉ nur konstruas por la dehakistoj en arbaraj regionoj; en la rivervaloj laŭlonge la flosriveroj tute ne ekzistas loĝejoj. La ripozajn momentojn oni devas pasigi sub arbo aŭ en dometo farita el koniferaj branĉetoj. Antaŭ la dometo devas esti brulanta fajro, por ke oni restu senfrosta. Sed eĉ en tia restadejo la dormo gustas bone, ĉar oni laboras 15 horojn tage. Tamen, ĉu oni povas konservi sian sanon en tiaj cirkonstancoj, estas alia demando. La tero estas plej ofte glacikovrita aŭ portas neĝtavolon.

Jen tiel, la lignoindustriistoj traktas siajn laboristojn, kvankam ili ricevas grandegajn profitojn.

Kompilis 5166.

VORTARO DE ESPERANTO



de KABE (D^ro^ K. BEIN)

Ĉi tiu internacia vortaro, verkita plene en esperanto, enhavas ĉiujn vortojn de nia lingvo (radikajn kaj devenigitajn), ĝenerale uzatajn de l' esperantistoj, kun esperanta difino de ilia rekta senco kaj iliaj ĉefaj figuraj signifoj. Ĉiu vorto estas difinita kun granda precizeco kaj mirinda klareco. Multaj frazmodeloj por klarigi la sencon de la vortoj kaj igi ilin memoreblaj, faras la verkon allloganta kaj vivanta.

Unu luksa volumo in-8, bindita, 175 pĝ.

Prezo: 2.20 mk. g. inkluz. sendkostojn.

ADMINISTRACIO DE SAT.

VOJAĜAJ IMPRESOJ EL SUDA AMERIKO

III

Gvajakil estas havenurbo de l' respubliko Ekvatoro kaj kuŝas ĉe golfo de la riverego Gvaja. La urbo, kiu estas lokita en vasta marĉo, havas ĉ. 120000 loĝantojn, el kiuj ĉ. centmil estas indiĝenoj. Pro la varmega kaj dum pluvoperiodoj malsaniga klimato okazas oftaj epidemioj (malario, flava febro), kiuj de tempo al tempo rikoltas dekmilojn da viktimoj. En la lastaj jaroj usonaj inĝenieroj konstruis freŝan akvoprovizejon, kiu efike plibonigis la sanitarajn cirkonstancojn. La urba estraro provis kelkfoje starigi ordon koncerne la purecon, sed ne sukcesis. La indiĝenoj ne facile forlasas siajn morojn: vivadi en senzorga malpureco.

Tion ja parte kulpas la mizerega stato, en kiu ili vivas, ĉar ili perlaboras nur maksimuman sumon de 2 sukre (½ dolaro) potage. En la dense loĝataj domaĉoj ili kuŝas inter ĉifonoj sur planko aŭ sur nuda tero ofte malseka kaj fiodoranta. Cetere mi vidis centojn kuŝantaj dumnokte sur la trotuaroj. Verŝajne senhejmuloj. Balaaĵon kaj malpuregaĵon la indiĝenoj ĵetas sur la straton, kie ĝi restadas dum tagoj, eĉ semajnoj, ĝis vento ĝin kirlas aeron aŭ ĝis ia duonoficiala institucio forigas ĝin. En la centro de la urbo, kie la domoj aspektas sufiĉe belaj kaj kie la pavimitaj stratoj estas puraj, loĝas la sinjorecaj blankhaŭtuloj. Jen laŭlonge de l' ĉefstratoj troviĝas belaj butikoj kaj eĉ luksaj magazenoj, kelkaj hoteloj kun restoracioj, kie diboĉuloj konsumas la kristaligitan ŝviton de la laboruloj, kiun ni nomas mono.

Kelkaj bankoj sen mono kaj sen fidindeco troviĝas ankaŭ tie. Estas kutimo en tiu lando, ke ĉefoj de oficialaj institucioj rabas monsumojn al ili fiditajn kaj forkuras trans landlimon. Kelkaj grandaj komercaj kaj fabrikaj entreprenoj estas en la manoj de eksterlandaj, ankaŭ eŭropaj kapitalistoj, kiuj starigas siajn proprajn kreditsistemojn.

Kelkaj provoj organizi la Laboristaron, ĉu profesie, ĉu politike, malsukcesis pro tio, ke la gvidantoj de laborulaj grupoj nur celis uzi ilin kiel ŝtupon por sia propra ambicio.

Lokaj ribeloj okazas ofte en tiu lando. Sed ili montriĝas nur rivalecaj intrigoj inter burĝecaj grupoj, kiuj klopodas akiri la potencon kaj havas nenion komunan kun sociaj ribeloj.

Ekvatoro havas ĉ. 2 milionojn da loĝantoj, el kiuj nur centmil estas blankhaŭtuloj. La tero estas parte tre fruktodona, kaj troviĝas nepre eblecoj garantii vivtenadon por dekoble pli granda nombro da homoj. La registaro subtenas diversmaniere la enmigradon, sed pro la varmega, malsaniga klimato kaj parte kaosa estrado de l' lando, la enmigrant-entreprenoj ĝis nun ne bone prosperis.

Muri.

Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — *Adm.*

PROLETARO KAJ DEMAGOGIO

Demagogio estas volo elvoki animstaton aŭ instigi al faro helpe de tiaj argumentoj, kiaj nek konformas al vero nek al la konvinkoj de l' alparolinto (oratoro) mem. Se oni ĉiutempe kun malestimo rilatiĝis al demagogio, tio ne estas pro moralaj motivoj, sed tute inverse. Jam sole la fakto, ke la rilato al demagogio restis la sama, kvankam tiel forte ŝanĝiĝis la sociaj kaj psikologiaj cirkonstancoj, estas signo, ke en demagogio kuŝas malbono, danĝera por ĉiu socio, sendepende de ĝia klasstrukturo en tiu aŭ alia tempo.

Nature, la enhavo de tio, kion oni nomas demagogio, ŝanĝiĝas kune kun la evoluo de la socio, sed la koncepto demagogio por si mem apartenas — samkiel mensogo aŭ hipokriteco — al ecoj, kiujn ĉiuj socitavoloj kondamnas, eĉ tiuj, kiuj uzadas demagogion kontraŭ la nove leviĝanta klaso. La primitiva memkonserva sento kaŭzas, ke ĉiuj homoj kondamnas mensogon, hipokritecon, demagogion.

Kiel membroj de viva komunumo, de laborkomunumo, ĉiuj homoj devas havi interkomprenigilon. La skribata kaj parolata vorto estas tia ilo por ĉiuj ŝtupoj de l' socia evoluo. Kun la tempo la vortoj alprenas difinitan, ĝenerale valoran signifon. Ili servas al tio, por ke la homo ne estu devigata ekfidi nur al sia propra persona sperto. Ili malfermas por li alireblon al regionoj, kiuj sen tio restus ŝlositaj. Ju pli disvolviĝinta estas homa kolektivo, ju pli intense kaj produktive[1]) paŝas la mastruma vivo, des pli certan ligilon la homoj bezonas. Ĉu la nuntempa homo povas vidi, legi kaj observi ĉion por li bezonatan? Ĉu estas imagebla socio, kie ĉiu ja dependas de aliu, sen reciproka interkonatiĝo, tio signifas, sen fido al vortoj de aliuloj?

Ju pli proksime ni venas al libera senklasa socio, des pli la membraron de socio regas reciproka konfido kaj vero. Kio en la nuntempa socio, bazita sur perforto kaj devigo, estas atingata per leĝo, per timigo antaŭ puno (la teno de vorto, ne devojiĝi aliun per falsaĵoj), tio devas esti atingata en la libera socio sen iu ajn devigo. Se tio ne estus ebla, tiam entute estus malebla la kunvivado en libera socio. Certe, la ĉefa kondiĉo por tio (eviti mensogon kaj falsecon) estas la forigo de l' klasoj, la forigo de kontraŭdiroj de l' interesoj. Sed ĝuste pro tio la avangardo de l' homaro, la antaŭbatalantoj por socialismo, jam nun ne uzu tiajn rimedojn.

La ĉefa fonto de l' mensogo estas ja tio, ke la regantaj klasoj devas iel vuali sian socian staton, siajn privilegiojn, ĉar tiuj ĉi lastaj sin bazas sur la senrajtigado de l' popolamasoj. Tiucele la regantaj klasoj devas ekmovi tutan aparaton: tio sekvigas la hipokritecon en la interrilatoj kaj konceptoj, kiuj respondas al la nuntempaj produktad-cirkonstancoj. Kvankam la reg-

[1]) Kvankam ne oficiala vorto, uzita de Zamenhof (= multproduktante).

TAGO DE L'RUĜARMEANO

Mi estas 21-jara laboristo-modelisto kaj aŭtune 1927 alvokita en la vicojn de l' Ruĝa armeo. Oni sendis min en lernejon por formado de gvidantoj el malpliaĝuloj. Mi komencis lerni milit-aferon kaj pasigi vivon de kursano-ruĝarmeano. Mi volas priskribi la tagon de la kursano kiel tagon de eduka laboro ĉe Ruĝarmeo.

Je la sesa horo matene oni siĝnalas en la kazerno la leviĝon. La kursanoj rapide ellitiĝas, ordigas siajn litaĵojn kaj sin mem kaj post 15 minutoj jam faras la matenpromenon, kiu servas kiel rimedo por korpkultura eduko kaj daŭras 15 minutojn. Kun kantoj oni reiras en la kazernon. Je la 6½-a la kursanoj matenmanĝas, kaj je la 7-a komenciĝas la okupoj. Du horojn oni okupas sin en la lernejo pri politika scio, kie oni konigas al la ruĝarmeanoj, kiuj estas la amikoj kaj la malamikoj de l' laboristoj, kun kuranta komentado pri la politika situacio en la tuta mondo. Post la "politika horo" la kursanoj lernas dum 2 horoj uzi siajn armilojn kaj la regulojn de l' militservo. Dum pluaj 2 horoj la kursanoj pretiĝas por militordo, por marŝo kaj ekzercoj kun armiloj. La tagmanĝo okazas je la 14-a, kaj de la 15-a ĝis 17-a estas en la kazernoj la "malviva horo", dum kiu oni ripozas kaj mallaboras. Post la 17-a la kursanoj okupas sin en la klubo, kie estas multaj rondetoj. Ili perfektigas sian legoscion, studas gazetojn kaj ĵurnalojn, laboras en la anguletoj de l' Lenin-ĉambro. Junkomunistoj kaj partianoj partoprenas en la laboro de la koncernaj ĉeloj. Ili sin politike klerigas. La kursanoj tre aktive partoprenas en la revoluciaj festoj de Sovetio. La feston de la Oktobra Revolucio la kursanoj festis kun la laboristoj de granda fabriko, kie ĉi lastaj akceptis la kursanojn fratece. Kun la kursanoj la laboristoj inaŭguris monumenton al K-do Lenin.

Mi ankaŭ estas komsomol-ano (junkomunisto) kaj aktive laboras en la ĉelo. En la lernejo mi organizis rondeton de esperanto kun 40 membroj. Mi gvidas la rondeton dufoje semajne, kaj la "lernantoj" de la rondeto lernas kun granda intereso la lingvon. La leterojn ricevitajn de eksterlandaj gekamaradoj mi legas al la lernantoj kaj kolektive konigas ilin kun la vivo de l' eksterlandaj fratoj. En la lernejo oni donas tre multe da atento al la internacia eduko de l' ruĝarmeanoj. Per la gazetoj, per la rondeto de "plenrajtaj reprezentantoj", per la komsomola kaj kompartia ĉeloj, kaj finfine per nia rondeto la kursano estas edukata en la spiritfrateco de l' tutmonda Proletaro.

Tiel pasas la tago de l' kursano en la regimentlernejo de la 49-a N.-Novgoroda pafregimento.

Kursano Mikaelo Golovkin (10068).

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

antaj klasoj faris el hipokriteco kaj malvero preskaŭ etikan leĝon, por povi pli efike ŝirmi siajn privilegiojn, kaj kvankam ili uzas ĉian rimedon, por povi malmoraligi la suprenleviĝantan klasanaron — malgraŭ tio ili malestime rilatas al mensogulo, perfidulo, demagogo.

El kio tio rezultas? Kial Kain-oj, Judas-oj kaj similaj estis ĉiam malamataj de ĉiuj klasoj? Respondo estas, ke ĉiu homo bone komprenas, kiel danĝere estus por sia klaso, se enviciĝus tien perfidulo. La abomen-sento al mensogoj, al perfido — tio estas la instinkto de memkonservado de ĉiu socia klaso . . .

Kompreneble, ekzistas diversaj formoj de demagogio. Ekzemple, se profesia gvidanto volas eviti lukton por plialtigo de salajro, ĉar li ne estas certa pri ĝia sukceso, tiucele li prezentas la situacion al la laboristoj en falsa lumo, — kaj tio estas demagogio. Kutime oni konsideras demagogiaj kaj malutilaj por la Laboristaro nur tiajn metodojn de laboro, kiaj elvokas ĉe ili trompajn esperojn, iluziojn kaj instigas ilin al elpaŝoj, kiujn ili sen tio evitus. Efektive, la malkapableco gvidi strikon aŭ protestlukton, povas esti tiel malutila kaj tiel fuŝi la klaskonscion, kiel facilanime gvidata batalo. Jam ne atentante la grandegan malutilon, kiun oni faras al movado, se oni kripligas ĝian revolucian karakteron . . .

En la socialisma movado, kiu estas estonteca movado, kaj en kiu la ĉefa faktoro estas la revolucia konscio de l' amasoj, oni ne oferu la fincelon pro la veraj aŭ laŭŝajnaj interesoj de l' estanto . . .

Anĝelika Balabanova.

Trad. L. Bergrad (10411) el baldaŭ aperonta libro "La marksisma edukado de l' amasoj".

Ĉu ne estas honto, ke Sennaciulo ne ankoraŭ atingis la nombron de 4000 abonantoj?

Se ĉiu K-do farus sian devon, certe tiu nombro estus baldaŭ superita.

Varbu, varbadu abonantojn . . .

★ DIVERSAĴOJ ★

La grandurba evoluo en Germanio

En Germanio la loĝantaro pli kaj pli tendencas amasiĝi en la grandaj urboj. En 1870 ĉiu dudeka loĝanto estis grandurbano, je la fino de 1890 ĉiu oka, nuntempe ĉiu tria loĝanto. La grandaj urboj ne kreskis el si mem, sed per enfluo de eksterurbaj loĝantamasoj. Titolon "grandurbo" havas urboj de minimume 100 000 loĝantoj. En 33 grandurboj jam en jaro 1900 estis de eksterurba deveno 56,7 elcentoj da loĝantoj. La urĝe solvotaj problemoj, kiuj estiĝas el tiu evoluo, estas la fortigo de l' higiena protekto, kaj la loĝej-konstrua problemo, kunligita intime kun la unua. Ĉar aliokaze oni havos en la grandurboj mortintan elcenton netolereblan.

Laŭ Leipz. gazeto komp. M. H. 1162.

La loĝantaro en Sovetio

Laŭ statistiko de jaro 1927 en tuta Sovetio loĝis 146 964 366 personoj. El ili 71 010 659 viroj, 75 953 707 virinoj, 44,5% ĝis 18-jaraj, ĉ. 46% de 18 ĝis 54-jaraj, kaj malpli ol 10% pli aĝaj ol 55-jaraj. 30 500 pers. estas gemaljunuloj pli ol centjaraj.

Laŭ Leningrada Vero trad. P. T. 9310.

Kontraŭsemidismo en Sovetio?

Sub ĉiuj rezervoj ni represas jenan sciigon: La "Krasnaja Gazeta" (Ruĝa Gazeto) publikigis artikolon, en kiu ĝi plendas pri la disvolviĝo de l' kontraŭsemidismo inter la laboristoj kaj la komunista junularo. Ĝi citas tagordon akceptitan de la laboristoj de l' fabriko "Lenin", postulanta, ke Batolomea nokto estu organizata kontraŭ la judoj, kaj ke ili estu sendataj Palestinon.

Ĉu li trovas Imitantojn?

La norvega komandanto ĉe stabo K. A. Bratt forlasas la militistan metion pro konsciencaj konsideroj. En sveda revuo li skribis artikolon, kiu faris grandan bruon, pri la proksima kemia milito. Li elmontras, ke oni prudente eĉ ne povas paroli pri milita defendo kontraŭ la teruregaj ruinigoj, kiujn la proksima milito faros al la civila loĝantaro, al la urboj kaj al la industrio.

Ne hontu montri vian esperantistecon kaj SAT-anecon!

PORTU LA INSIGNON DE SAT!

La insigno estas ekkonilo kaj varbilo.

La granda insigno
diametro 18 cm. kostas 0,80 mk. g.
La malgranda insigno
diametro 12 cm. kostas 0,60 „ „
La malgranda insigno
por ne SAT-anoj . . . 0,60 „ „

Haveblaj ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

El la Administrejo

Koncernas akcibiletojn de nia Kooperativo. — Hodiaŭ ni publikigas la numerojn de tiuj akcibiletoj, kiuj depost la lasta duonjaro estas dum daŭro de tri jaroj en la manoj de l' posedanto. Tiu lasta rajtas, laŭ surpreso (vidu vian akcibileton) ricevi jare 10% da rentumo. Post publikigo de tiu ĉi komuniko, la posedantoj de akcibiletoj povas, se ilia numero troviĝas inter la sube cititaj ciferoj, aŭ repostuli sian monon plus la rentumo (en tiu okazo la akciposedanto devas resendi al ni la akcion) aŭ, se li ne informas nin, la administracio transskribos la rentumon de la unuaj tri jaroj al la kredita konto de la akciposedanto, kaj la akcibileto, kiu troviĝas en la manoj de la koncerna K-do aŭ K-dino ekpaŝos la vojon al la dua trijàro, laŭ la samaj kondiĉoj kiel antaŭe. — Tamen la rentumo de la unua trijaro estas ĉiam je la dispono de la koncerna K-do. Li povas ricevi ĝin, ĉu per mono, ĉu en formo de libroj aŭ aliaj objektoj el la administrejo de SAT. — Por ke la Gek-doj bone povu kontroli la numerojn de siaj akcibiletoj, ni ĉi-kune publikigas la numerojn el la serioj A kaj B, kiuj rajtas al rentumo:

Serio A. — 1—5, 8—19, 22 k 23, 26—92, 96—99, 101—105, 109, 115 ĝis 120, 122—135, 137, 140, 142 ĝis 144, 147—155, 162—164, 167—172, 178—184, 188, 190—197, 202—204, 206, 208, 211—214.

Serio B. — 2 k 3, 5—36, 38—41, 44—58, 60—107, 109—134, 136 ĝis 140, 145, 147—149, 154—158.

Ni ne preterlasu la okazon por danki al niaj fervoraj Gek-doj, kiuj dum la daŭro de tri jaroj lasis al SAT sian monon por la bono de nia movado. Ni ne dubas, ke la Gek-doj ankaŭ estos pretaj fari la samon dum la venontaj tri jaroj.

Necesas, ke ankoraŭ pli multaj Gek-doj aĉetu niajn akcibiletojn, ĉar tiu mono ja ĉiam estas certa al vi. Multaj Gek-doj jam spertis la utilon de tiu aranĝo, despli, ĉar la administracio ĉiutempe akceptas tiujn akcibiletojn kiel kontantan monon. Per tiuj akcibiletoj la Gek-doj povas pagi al la administracio ĉiun ajn varon.

A d m.

El la Redaktejo

Ĉu la somera varmeco kulpas, ke ni dum la lastaj semajnoj ne plu ricevis manuskriptojn de niaj kunlaborantoj? Almenaŭ ni konstatas la fakton. Eble kelkaj K-doj estas tro timemaj, ne fidante al si la kapablon verki ion por "S-ulo", ĉar ni devis averti diversajn K-dojn, kiuj verkis tro malbone, efektive ne finlerninte la lingvon. Kompreneble ĉi lastaj ne povis atendi, ke ni aperigu iliajn fuŝverkaĵojn. Sed aliparte ekzistas sufiĉe granda nombro da K-doj, kiuj scias verki sufiĉe bone en esperanto: Kial ili restas mutaj kaj nenion raportas al ni por diskonigo al la tutmonda Legantaro? Vi ĉiuj scias per la enhavo de "S-ulo" kaj per niaj admonoj al la usonaj K-doj k. c., kiajn artikolojn la redakcio atendas, kiuj estas plej valoraj kaj taŭgaj por nia organo. Artikoloj kun ĝenerale interesa kaj leginda enhavo, laŭpove originale verkitaj, neniam estos malakceptataj de ni. Precipe ni bedaŭras, ke jam delonge ni ne plu povis aperigi artikolojn el Hispanio, Portugalio, Norvegio, la Sudamerikaj Ŝtatoj, kvankam ne mankas tie SAT-anoj. Ekvekiĝu, dormantoj, kaj kunlaboru al via gazeto!

N. B.

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

La "Fundamento de Esperanto"[1]) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.

L. L. Zamenhof.

[1]) Mendebla ĉe nia Administrejo.

Ankoraŭ pri volontulaj tradukistoj

Tiu ĉi demando, tre ĝustatempe tuŝita en n-oj 160, 167, 181 de "S-ulo", devas turni la apartan atenton de ĉiu SAT-ano al la organizo de intern. interligo inter proletaj organizoj per esp-o. Aparato de volontulaj tradukistoj estos la sola praktika rimedo por vera, proksima interrilatigo de nacilingvaj prolet-organizoj. Ni ne bezonas diri, ke priservado al ili estas plej efika rimedo por propagando de nia ideo. Ni efektivigos nian celon, laborante de malsupre; sed certe ankaŭ estas gravega tasko konvinki la gvidantojn pri la neceseco de lingvo intern. Ankoraŭ multaj lab. organizoj tute ne konas sencon k celojn de SAT. Nur oferante niajn tempon k kapablojn, ni montros al la mondo la gravecon de l' SAT-aparato k varbos novajn bonvolajn adeptojn.

Ĉiuj SAT-rondoj k izoluloj agu en la kulturaj, partiaj k profesiaj organizoj de iliaj laborejoj por atentigi ilin pri la afero de l' interligo kun eksterlandaj organizoj. Ne unue ni varbu al esp-o k SAT, sed ni pruvu al ili la necesecon. instigante ilin komenci nacilingve la interligon k mem estante la tradukantoj. Por la komenco de l' kolektiva interligo mi proponas verki por "S-ulo" artikolojn priskribantajn vivon k laboron en laborejoj k organizoj, kiuj deziras korespondadi kun similaj en eksterlando. Ankaŭ por SAT-anaro estas bezonata vigla interŝanĝado de spertoj k metodoj de plej ĝusta k sukcesa laboro. Al tio "S-ulo" donu pli da atento.

V. Belogorcev (7495).

INTER NI

— Ĉu povas esti patriotoj en SAT?

— Kial ne?

— !!?? . . .

— Nu, ĉu do ne ekzistas laboristaj partioj, kiuj konsentas la patriotismon kaj nacidefendismon? Ĉu vi ne scias, ke tiuj partioj konstante agitadas por la sendependeco . . . de Ĉinio, de Maroko, de Georgio, de Hindio k. a. landoj? Ĉu vi deziras, ke ni eksigu el SAT la K-dojn, kiuj estas anoj de tiuj partioj?

— Certe ne . . .

— Sekve estu konsekvenca kaj konsentu, ke patriotoj povas aliĝi al nia Asocio . . .

— Sed ŝajnas, ke tio malkonformas al la nomo de nia organizo.

— Ni ne troigu la aferon. Kio karakterizas nian asocion, estas ĝia strukturo laŭsektora. Eĉ se ĉiuj anoj estus patriotoj, SAT tamen konservus sian sennaciecan karakteron, tiom longe, kiom en ĝia organizformo oni ignoras la naciojn.

En la kadro de nia asocio neniu povas paroli je la nomo de sia kara patrio, ne povas sekve influi naciece ties gvidadon. Laboristo, kiu aplikadas esperanton per la SAT-aparato, vole nevole estas devigata kutimiĝi al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo.

Tio, laŭ mi, estas plej grava. Se iu proponus la ŝanĝon de la sennacieca strukturo de SAT, mi akre kontraŭbatalus tian proponon. Sed mi ne vidas grandan danĝeron en la fakto, ke kelkaj patriotoj troviĝas en niaj vicoj . . .

Ni ne devas enmiksiĝi en la politiko de partioj. Kaj se ni devigus ĉiun SAT-anon malkonfesi patriotismon, tio estus ia enmiksiĝo . . .

Por mi ne estas mirige, ke laboristaj organizoj konservas patriotisman ideologion. La malo estus vere miriga. Tio signifus, ke oni povas fariĝi sennaciulo sen la helpo de esperanto. Se tiel estus, la rolo de SAT fariĝus tre sensignifa en miaj okuloj . . .

E. L.

La malpermeso en Bulgario

Ni raportis en n-o 191 mallonge pri la ministeria dekreto en Bulgario kontraŭ esp-o. Interese estas ekscii, kiel la "kleriga" ministro motivigas la malpermeson, kiu trafas la lernantojn. Li diras en la cirkulero: "Ĉar esp-o estas facila lingvo, la lernantoj ekkutimos al facilaĵoj kaj perdos la volon lerni pli malfacilajn aferojn (!); ĉar esp-o estas internacia, la lernantoj ekŝatos la internaciismon kaj ekmalŝatos la nacian lingvon kaj kulturon; fine la esp. movado estas suspektata, ke sub ĝi kaŝiĝas bolŝevistoj kaj anarkistoj (!). Tiaj estas la ĉefaj motivoj."

La Lingva Angulo

Ĉi sube ni publikigas du demandojn, kiujn faris al ni legantoj kaj kiujn ni prokrastis respondi, ĉar ni mem ne havis firman opinion pri ili. Ni lasis la respondon al s-ro W. Lippmann, direktoro de la Sekcio: Gramatiko en la Akademio, al kiu ni nin turnis tiucele.

Red.

Demandoj:

1. Ĉu post substantivigitaj nombroj, cifere (ne litere) skribitaj, oni ne devus meti la subkomprenatan **"da"**? (S-i.)

2. Ĉu en la frazo (PETRO, pĝ. 11, linio 12) "li rakontis, ke la ĉefo maldungis lin, ĉar li, la antaŭan tagon, 'ŝtelis' kelkajn lignopecojn" la komoj, kiuj enfermas "la antaŭan tagon", estas necesaj? (D-ano.) Ĉu tiu frazparto "la antaŭan tagon" povas esti nomata "propozicio"? (B-o.)

Respondoj:

1. Simpla nombro (numeralo kardinala) havas adjektivan karakteron. Tiel ekz. kvin, naŭ, cent, mil okdek tri. Pro ilia plursilabeco, eble ankaŭ pro konsidero al la akcentregulo kaj sekvante la naciajn lingvojn, Zamenhof forprenis ĉi tiun adjektivecon de la numeraloj miliono, biliono, triliono ktp. donante al ili la substantivan finaĵon, kiu ne estas ellasebla. El tio sekvas ke oni devas uzi post ili la prepozicion "da", kiel post "trio, dekduo, cento k. s." (En specialaj kazoj oni devas uzi "de"; ekz. milionoj de ĉi tiuj fiŝetoj svarmis ĉirkaŭ la ŝipo). Ĉar aliflanke la ciferoj tute ne apartenas al la lingvo, sed nur al la skribo, ĉar ili estas nur mallongigaj signoj de la vortoj, ne povas esti dubo, ke oni devas skribi, kiel oni parolas: "12 000 000 **da** loĝantoj" kaj ne 12 000 000 loĝantoj(n)".

2. En la frazo: "Li rakontis, ke la ĉefo maldungis lin, ĉar li, la antaŭan tagon, ŝtelis kelkajn lignopecojn" la strekitaj komoj estas ne necesaj, sed utilaj, ĉar ili avertas la leganton, unuavide rigardi la vortojn "la antaŭan tagon" kiel objekton (komplementon) de "ŝtelis". Tia kom-uzo sekvas la francan regulon, apartigi per komoj plurvortajn adverbecajn esprimojn. Ĉi tiu regulo ne ekzistas en esp-o, kio ne malhelpas, ke ĝia apliko en specialaj kazoj estas rekomendinda. La interpunkcio estas nur skriba helpilo, por faciligi la rapidan komprenon de la frazkonstruo. Kio servas ĉi tiun celon, do estas bona. Por severaj reguloj en pli specialaj kazoj ne venis ĝis nun la taŭga tempo. La nuna libereco laŭ mia opinio ne pruviĝis iel malutila. — Adverbeca esprimo kiel "la antaŭan tagon" ne estas propozicio.

D-ro W. Lippmann.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

USONO. Nov-Jorko. K-do P. Kraŭĉ, kiu revenis el Sovetio, parolis esp.-lingve ĉe "Labor-Temple" sub aŭspicioj de "Esp. Laborularo". Ĉeestis multaj neŭtraluloj, sed bedaŭrinde venis nur malmultaj speciale invititaj komunistoj, komjunuloj k pioniroj. K-do Kraŭĉ parolis pri vivkondiĉoj k esp. movado en Sovetio. Li ankaŭ respondis al multaj demandoj k konsiderante la inertecon de la esp. movado usona, la kunveno estis sukcesa. SAT-eldonaĵoj bone estis vendataj. — K-do Theod. Weder estas elektita por gvidi la Esp. Servon de l' 29-a k 30-a sektoroj. K-do G. Gabor faris paroladon ĉe ĉi tiea Hungara Lab. Kleriga Hejmo; li parolis hungarlingve, skizante historion de intern. lingvoj k detale de esp-o, li priskribis la mondajn organizojn esp-istajn k fine elmontris celojn k idealojn de SAT k ties Nov-Jorka grupo. Enskribiĝis sekve tuj 15 lernantoj por aranĝota kurso, kiun li gvidos. Krome li devis dufoje ripeti sian paroladon ĉe hungaraj rondoj en aliaj partoj de la urbego. — K-do Kraŭĉ, kiu paroladas en div. urboj sub aŭspicioj de la Kom. Partio, tamen trovas tempon por fondi SAT-rondo k esp. kursojn. En Wilmington, Deleware k Filadelfio, Pensilv., li jam sukcesis organizi kursojn k SAT-anigi kelkajn (jun)komunistojn. (1092)

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L'Etincelle (Fajrero), Bruxelles, 20. 5., Tago el vivo (6351); Der Eisenbahner (Fervojisto), Wien, 25. 5., Nuntempa lab. sit. en Usono (188).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, London, 25. 5.; PAX, Paris, 25. 5.; L'Internationale de l'Enseignement (Eduklab. Intern.), Paris, majo; Semajna informilo de kultur-interliga soc. de Sov. kun eksterl., Moskvo, majo (pri Minska lab. interkorespondo k resumo en esp-o).

Peresperantajn leterojn enpresis:

Karmir Zinvor (ruĝa soldato), Erivan, 1. 5.; Leningrada Vero, 1. 5.; Laborista Vojo, Smolensk, 29. 4.

NIA POSTO

6600. — Via artikolo aperos en "SR", literatura serio. Red.

Sovetiano. — Vi eraras: R. Rolland tute ne estas en Svisio ekzilita de la franca registaro; li mem "ekzilis" sin tie k venas Francion kiam plaĉas al li. E. L.

Internacia Esperanto-Muzeo. — Ni ŝatus ekscii en kiu vortaro vi lernis la signifon de la vorto "neŭtrala". Se via entrepreno estas "nek laborista, nek komunista, nek katolika" ktp. tio signifas por ni, ke ĝi estas neŭtrala. Sekve vi ne devus miri, ke ni lokis vian informon en la rubrikon "Ĉe la neŭtraluloj".

12 340. — La klarigojn por la mallongigoj de vi citítaj vi trovas en ĉiu n-o, en kiu aperas korespond-anoncoj, sub la titolo "Korespondado". Red.

2978. — Aparta abono al Edukada Serio de "SR" ne ekzistas. Adm.

Sciigo. — La adreso de la Internacia Esperanto-Muzeo (vidu n-o 184) estas Wien I, Annag. 5 (Aŭstrio). Pro sendo de materialo aŭ informoj oni sin turnu al tiu adreso.

LEGU ĜIS LA FINO!

15. julio 1928 en Samara **okazos kongreso** de fervojista profunuiĝo ĉe Samara-Zlatousta fervojo (la fervojo etendiĝas je 2090 kilometroj). **Sendu salutleterojn** de vialokaj profunuiĝoj, sociaj organizoj, laborkolektivoj, grupoj ktp. **Respondo** en nomo de la kongreso (neesperantista) estas **garantiata.**

Dum la kongreso ni aranĝas **grandan esp. ekspozicion. Sendu esperantaĵojn,** gazetojn k ĵurnalojn en esp-o k naciaj lingvoj, fotojn de viaj ekspozicioj ktp. Laŭeble sendu pli multe da fervojistaĵoj (PI kun stacidomoj, lokomotivoj ktp., konformajn ĵurnalojn ktp.). **Por rekompenci** sendotaĵojn, ni speciale abonis ruslingvajn ĵurnalojn: "Ruĝa Grenkampo", "Korpkulturo k Sporto", "Ekrano", "Sendiulo" k duonesp-lingvan "Bultenon de CK SEU". **(Vi povas mem elekti.)** Kontraŭ foto de via ekspozicio ni sendos foton de la nia; kontraŭ kompleto — la samon. **La interŝanĝon ni daŭrigos ankaŭ post la kongreso.** Helpu disvastigi esp-on ĉe la tuta fervojistaro.

(En nacilingvaj sendaĵoj bonvolu traduki bildtitolojn. Bonvolu relegi en n-o 181, p. 200 noton "pri interŝ. de salutlet.".)

Adresu ĉion al: **B. Ĵeleznjakov,** USSR, **Samara,** Uralskaja 29, kv. 3. (5583)

Korpkulturanoj, atentu!

Rondeto de Korpkulturado ĉe Samara fervojista klubo je nomo de Revolucio de j. 1905 dez. koresp. kun samaj rondetoj ĉl. k kun apartaj korpkulturanoj (L, PI, PK).

Koresp-ajojn sendu al K-do Timinskij Boriso, USSR, **Samara,** Arcibuŝevskaja, 51, kv. 7.

Serioza enketo

K-do **A. Soares** (villa magnagna) Quartier du neuf Hôpital à S. Jean-de-Luz (B. P.) petas de ĉiuj kompetentaj gek-doj el ĉ. l. informojn pri kampara k urba meza salajro por ambaŭ seksoj laŭ 8-hora labortago (ĉion aparte).

Al Sovetiaj Kamaradoj!

K-do **N. S. Riŝkov** (esperantisto de la jaro 1909, SAT-ano 5327), termezuristo — arbarkulturisto, estinta instruisto de arbara lernejo, desegnisto de supera kvalifiko, havinta 12-jaran praktikon, — deziras ŝanĝi la nunan oficon. — Mi preferas havi la oficon de instruisto en arbara aŭ termezurista teknikumo. La proponojn oni sendu: **Kursk,** strato de Lenin 90. Al helpemaj K-doj mi sendas antaŭdankon!

URĜAS!

"Festo de la Laboro" okazos la 24-an de junio en Chemnitz. Partoprenos: sindikatoj, kooperativoj, lab. sportularo, kantularo, kulturaj organizoj. La lab. esperantistaro de Chemnitz petas eksterlandajn gek-dojn, tuj sendi salutskribaĵojn, se eble je la nomo de iu organizo. Ni certe resp. per PI. Adr.: "Fest der Arbeit" (Festo de la Laboro), Zwickauer Str. 152, ĉe ADGB, **Chemnitz** (Germanio).

Bulgario

Vivĝoja juna batalanto deziras korespondadi nur per belegaj PI, bfl. kun ĉiulandaj gejunuloj, prefere kun junkamaradinoj. Adresu: Iv. Ŝkodrov, "Princ Kiril", **Gabrovo.**

La plej juna sennaciulino aperis en la mondo!

Al gek-doj Nikitin el Sovetio la 15. majo naskiĝ. knabineto (unua ido) nomata

VLADILENA

Oni petas sendi al ŝi ludilojn k al la gepatroj salutleterojn. (Ambaŭ estas geesperantistoj).

Adreso: BEĴECK, Tversk. gub., Krasnoarmejskaja 44, al A. S. Nikitin. (12408)

ENHAVO:

	paĝo
Lando de suno — kaj malsato	295—96
Laborista solidareco en Francio	296
Elisée Reclus	297
Regna renkontiĝo de Ruĝa Fronto Tutgermania	298
Pri loĝejaj cirkonstancoj de la arbarlaboristoj en Norda Finnlando	298—99
Du horoj el mia vivo	298
Vojaĝaj impresoj el suda Ameriko	299
Proletaro kaj demagogio	299
Tago de l' ruĝarmeano	300
Diversaĵoj	300
Tra Esperantio	301—02
Anoncoj	302

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

Steiner